ASISTI invitas sincere ĉiujn interesiĝantojn
al la IRKE-seminario kun la temo

# "Integreco de la sano fizika, psika kaj spirita"

okazonta ĵaŭde en la antaŭsalono de DRAĴEV (teretaĝo)
(ne estas indikite en la Kongreslibro!)
kaj vendrede en la salono HODLER (la 4-a etaĝo)
ĉiam inter 16.30 kaj 18.00

La temo, ĉi-foje larĝe transpaŝanta la studkampon de ASISTI, estas elektita ne hazarde. Lastatempe oni ĉiam pli kaj pli venas al la ekkono, ke sano estas ne nura neĉeesto de korpa (aŭ eventuale psika) doloro kaj sufero, kaj ke ekkompreno de ĝia vera esenco kaj ektrovo de la ĝustaj vojoj al ĝi estas la baza antaŭkondiĉo de la homara estonto. Ĝis kiam malsanos en sia interno unuopaj homoj, ĝis tiam malsanos la tuta socio kaj la tuta Tero.

La seminario celas esti eta kontribuaĵo en la ampleksega procedo de tiukampa sinekkonscio.

## ĵaŭde la 25-an de julio

Bradio Moro III (Usono/Pollando) - TAOISMO KAJ LA SERĈO DE LA LONGVIVECO

Philippe Chauvignon (Francio) - REGENERADO KORPA KAJ SPIRITA

## vendrede la 26-an de julio

Christian Lavarenne (Francio) - JOGO KAJ SANO

Pavla Dvořáková (Ĉeĥio) - SANO KIEL SPIRITA TASKO KAJ MALSANO KIEL LA VOJO

Postsekvos diskuto kaj libera tribuno por pluaj etaj kontribuaĵoj pri la seminaria temo.

Samtempe kun la prelegoj vi havos unikan okazon ĝui agrablajn efikojn de muzikoterapio kaj aromoterapio!

NANDIR-filmrealigaĵoj proponas en la kongresa libroservo novajn vidbendojn: LA VERDA STELULO - scienc-fikcia filmo, kie aktoras Rolfo, Georges, Lagrange kaj Lucienne Dorat, la plej freŝdata produktaĵo en E-o de Laŭzana Esperanto-Societo. Ĝi rakontas la trakosman alvenon de Ulo kiu deziras pace komuniki kun la teranoj. Homara mesaĝo sendita el *Voyager* la kosmoveturilo, angle kaj esperante vokas stelulojn tra la senfina spaco.

kongresejo, AIS tiucele luis la salonon "Marso" en la konferenccentro "Galaksio" en hotelo Forum. Ĉirkaŭ dekono de la interesuloj eĉ restis por submetiĝi al skriba ekzameneto pri la enhavo de la kurso, cele al akiro de atesto de AIS, kiu validas kiel studunuo por pliaj studoj ĉe AIS.
AIS, kiu kunlabore kun la Internacia Kongresa Universitato proponas ankaŭ aliajn kursojn kaj prelegojn, morgaŭ je la 9-a horo kunvenos en salono Bácskai por sia Akademia Forumo, kiu ĉiufoje traktas temon gravan por la akademia laboro aŭ por scienco ĝenerale. Ĉi-foje la temo estos eblaj adaptoj aŭ aldonoj en la strukturo de AIS. La forumon gvidos OProf. Tyburcjusz Tyblewski.
SUS 16, la 16a studkonferenco de AIS, daŭros ankaŭ post la fino de UK ĝis merkredo, la 31-a de julio. Kursoj kaj prelegoj okazos en ejoj de la pedagogia fakultato de la Karla Universitato, en strato Rettigove 4, atingebla de la metroa stacio Národní Tĝida.

**AŬKCIO**

Unu el la plej interesaj kaj sur surprizoplenaj UK-programeroj ĉiam estas la aŭkcio. Tie vi povas akiri librojn aŭ aliajn varojn, kiujn vi serĉis jam delonge aŭ pri kies ekzisto vi ĝis nun eĉ ne sciis. Ĉi-foje la aŭkcio okazos **vendrede** je 12,15 ĝis 13,45 en salono Lapena. Jam antaŭe vi povos konatiĝi kun la aŭkciaĵoj en la libroservo, kie ili estas ekspoziciitaj je 9,00 ĝis 11,00.

**Reagoj**

En la memorlibron de dumkongresaj bildekspoziciantoj rigardinto enskribis, ke oni devu pli intense konigi Esperanton ankaŭ al la publiko ekster la kongresejo. Tiu instigo inspiris al la sekvanta poemo:

**Letero eksteren**

Karaj!

Kunvenas trimilo
eltutamonda;
homoj konsciaj
pri il´ kompreniga,
paciga rimedo,
ŝanco unika
por nia planedo;
modelkomunumo,
mikrosocio kultura
malferma eksteren,
frukt´ semadpreta,
pruvita, matura:
Kontaktoj komprenaj
kun ĉiu pri ĉio!
- Pensu pri tio.
Al vi persone, ne al iaj,
korsalute elkongrese!

(Ora-Prage, naŭdeksese.)
**Viaj...**

Franz-Georg Rössler

ILEI-konkurso

**Gajnintoj**. En Kongresa Kuriero n-ro 1 aperis ekstra kongresa n-ro de la tradicia ILEI-konkurso. Plej sukcese solvis ĝin s-ro *Jindr ich Tomí š ek* (1646), Ĉeĥio. Pro bonaj solvoj meritas laŭdon: s-ino *Magdalena Juhá sz*, Hungario, d-ro *Pé ter Pá l Denke* (1743), Hungario, s-ro *Torsten Lund* (1107),

Svedio, s-ro *Miĥail Ŝestov* (1420), Bjelorusio. Ni gratulas kaj petas ilin ĉiujn veni al la budo de ILEI ĵaŭde post la 15-a horo por transpreni librodonacojn.

**Premioj** de LOTERIO INTELEKTA estos transdonataj en la salono Bácskai vendrede je la 17-a horo. Se vi aĉetis loterion, bv. ĉeesti.

**BALTMARO**

**hodiaŭ je la 18.00 en la trinkejo de la dua etaĝo!**

MONDA TURISMO

Marde, en salono Lapenna okazis kunveno de Monda Turismo - faka asocio aliĝinta al UEA. La kunvenon partoprenis ĉ. 300 gekongresanoj - kiuj certe ne perdis la tempon, krome ĉiuj ricevis multajn materialojn pri la agado de MT. Estis prezentitaj ĉefaj celoj de Monda Turismo - pruvi ke la internacia lingvo funkcias ankaŭ en la fako de turismo.
Varmege estis akceptita fondinto de MT (antaŭ 26 jaroj en Vieno) - S-ro Max Finkenzeller, hodiaŭ 90-jara.
Pri sia laboro raportis la estraranoj: **Milan Zvara**, Ĝenerala Sekretario el Slovakio, **Lucille Harmon**, Vicprezidanto el Usono, **Angel Todorov**, estrarano el Bulgario, **Aŭgusto Quasqero de la Cruz**, estrarano el Hispanio, **Marcel Delforge**, revizoro, el Belgio, **Regina Grzebowska**, direktorino de Turisma Servo de MT el Pollando.
Okaze de la tago de lernejo multe da tempo oni dediĉis por sufiĉe nova aktiveco de MT - Internacia Studumo pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, Pollando - trijara kolegio, kiu sukcese funkcias jam 6 jarojn . La informojn pri la Studumo prezentis juna oficisto de MT- Andreo Grzebowski. Daŭre eblas aliĝi al la Studumo, kaj kiel studento, kaj kiel preleganto.
Ĉiuj partoprenantoj de la kunveno estis kore invititaj al 7-a Internacia Kongreso al Hispanio, kiu okazos en julio 1997 en Valencio, kaj al aliaj abundaj aranĝoj vaste tra la mondo.
*Regina Grzebowska*

TAGO DE LERNEJO

okazis marde en salono Karolo Piĉ, kiu estis plenplena. Nova TV-vidbendo kun vivaj aktoroj, prezentantaj unu familion kaj ĝian ĉiutagan vivon, plaĉis pro sia ridiga spriteco. Post programo, anoncita jam en Pragaj Sonoriloj 1, venis surprizo - fraŭlino Barlaston, kiu tre sprite legis ĉapitrojn el Mazi-serio kaj eksplodigis ridegojn ĉe la aŭskultantoj.
Post la kongrese sekvos tuj ILEI-konferenco kaj gimnazio en Tá bor, suda Bohemio.

Radio-intervjuo

La 24-an de julio 1996 redaktoro de la Ĉeĥa Radio, s-ro Josef Vomá c ka, intervjuis pertelefone rektoron de la Internacia Kongresa Universitato, prof. Dr. Vlastimil Novobilský. La interparolo estis elsendita vive pere de la plej aŭskultata radioprogramo "Radiož urná l" (Radioĵurnalo) kadre de la Ĉeĥa Radio. La rektoro respondis tri demandojn de la redaktoro, nome

*1. kio estas IKU, ĝiaj celoj, temoj de la prezentitaj prelegoj*

La rektoro klarigis al la aŭskultantoj la tradicion de la universitato, ĝiajn celojn kaj taskojn kaj menciis temojn de ĉiuj 9 perelegoj, kiuj estis elektitaj el 27 proponitaj.

*2. kiu estas la plej prominenta partoprenanto de IKU, pri kiu oni parolas*

Respondo: prof. Reinhard Selten, Nobel-premiito, kiu prezentis sian prelegon pri ludo-teorio.

*3. la stato de aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko*

Prof. V. Novobilský koncize tuŝis unuopajn historiajn frazojn de scienc-teknika apliko de Esperanto kaj konstatis, ke ĝi kreskas ĉefe en lastaj jaroj, kiam aperas fakaj vortaroj kaj terminaroj, gazetoj specialigitaj por unuopaj fakoj.

Fakkunsido de Oomoto

Raportas Joel Brozovsky. Pri la fakkunsido res-ondecis Deguĉi Masato; ĝin prezidis Takano Haruki. La fakkundido de Oomoto logis proksimume 650 kongresanojn al la salono Lapenna lundon matene - nombro kiu egalas al la rekordo farita en la jubilea kongreso en Varsovio. Trideko da oomotanoj kaj amikoj prezentis ekrigardon al japana kulturo kaj la agado kaj pensoj de la japana religia organizo Oomoto.
Ĉeestantoj povis sperteti oomotan meditadon *ĉinkon* por kvietigi kaj koncentri la animon, kaj spekti no-dancon, popolkanton kaj magion. Kelkaj eĉ povis gustumi japanan verdan ceremonian teon. La nova direktoro de EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), DEGUĈI Masato, parolis pri siaj spertoj kaj pensoj rilate al la kongresa temo.
Speciala gasto el la ne-Esperanta mondo, James P. Morton, Dekano de la Katedralo de Sankta Johano la Teologo en Novjorko, Usono, parolis pri sia sperto dum 21 jaroj kunlabori kun Oomoto en interreligia kaj ekologia agado. Tion li rilatigis al la agado de Esperanto, kion li unuafoje spertas ĉi tie en la praga UK. Li parolis iom ankaŭ pri sia plano starigi ion tute novan; tio estas ia centro en Novjorko por interreligia agado. Temas pri konstanta loko kie ĉiaj religioj povu kunlabori por komunaj celoj, prezenti sin al la mondo, kaj aranĝi komunajn eventojn.
Lia parolo instigis reagojn el pluraj aŭskultantoj kiuj simpatias kun tiuj celoj.

**Esperantisto Slovaka 50-jara!**

La gazeto de esperantistoj en Slovakio ĝisvivas sian 50-an vivjubileon. Post paŭzo ĝi denove aperas kaj por intersiĝantoj ĝi estas trovebla ĉe la rendevua tablo, aŭ rekte ĉe la redakcio: Esperantisto Slovaka, Stano Marĉek, Zvolenská 15, 036 01 Martin, Slovakio. La abonkotizo estas libervola - ricevados ĝin ĉiu, kiu sendos al la redakcio libervolan mondonacon.

---

**Aldono al la naŭa Kongresa kuriero - ĵaŭdo la 24-an de julio 1996**

La Laborgrupo por varbado

Prezidis estrarano Triolle, ĉeestis Lindblom (SE), Kvakland (NO), Ledon (BR), Rozenfelde (LV), Darbellay (DE), Huppertz (ND), Yamasaki (JP), kaj observanto Adamske (BE).

**I. Raportoj de la sialanda situacio**

Diskutoj unue estis ĉefe pri varbado ĝenerale, poste konvertiĝis al la specifo pri tiu por individuaj UEA-membroj. Montriĝis diferencoj laŭ la landoj:
1. En orienta Eŭropo ekonomiaj kaŭzoj estas gravaj, dum en la okcidento troviĝas malkontento pri tio, ke oni estas punata de subvencio de tarifo B (1-monata salajro pagas 11 kotizojn en riĉaj landoj, 3 kotizojn en Paragvajo, 2-monata salajro pagas 1 kotizon en Nikaragvo; 10% de kotizoj estas por pagi kotizojn kurioze, kotizo de UEA estas pli malalta ol tiu de LA en Brazilo)
2. En Nederlando, evidenta utilo de servoj de UEA (Jarlibro, UK ktp.) altiras al tiu ĉi pli da membroj ol LA, dum en aliaj landoj la vico de aliĝo estas unue al LA, due al UEA.
3. Ĉie, aĝo de LA-membroj estas alta. Oni celas junulojn, sed ili havas aliajn interesojn. En Germanio oni optimismas, ĉar maljunuloj havas tempon kaj monon dum junuloj interesiĝas facile, inkluzive de Esperanto.

**II. Konkretaj rimedoj proponitaj**

1. Delegitoj estu utiligitaj por varbado; por tio ili estu edukitaj (Svedio: aliaj ĉeestantoj unuanime

konsentis)
2. Kombinu varbadon por UEA kun tiu por LA. En Brazilo oni dissendas du aliĝilojn kune al 3000 personoj, inkl. eksaj membroj, el kiuj 700 revenas al lokaj grupoj.
3. UK estas granda ligilo, eĉ miraklo (Brazilo), kvankam estas ebleco ke oni unu fojon aliĝinto, eksiĝas la sekvan jaron.
4. Troviĝas homoj, kiuj aliĝas, se nur por la Pasporta Servo.
5. UEA mem devas reteni kaj varbi, skribante rekte al ind. membroj
6. Estas efike distribui materialojn ĉe ekspozicioj por instruistoj.

**Konkludo**: Kreu komisionon por esplori manieron de varbado laŭ karakterizoj de unuopaj landoj, sub komuna devizo, UEA 2000 (1000 membroj ĝis la jaro 2000)

---

**IKEF invitas siajn membrojn kaj aliajn interesatojn pri komerco kaj ekonomio/ekonomiko al sia Ĝenerala Kunveno (jarĉefkunveno), kun larĝa diskutado pri la celoj de la fakgrupo. Dato kaj horo: Vendredo 26 julio, 15,15 h, salono Pumpr. Plie ni invitas vin al diskutado pri la ekonomia situacio de Ĉeĥio kun reprezentanto de la Komerca Ĉambro. La kunveno okazos en la domo de la firmo ROBERT BOSCH s.r.o., Podviš novkou 25/1661, Praha 4. Dato: vendrede 26 julio, 10,00 h. Kunveno je 9.10 h en la kongresejo ĉe la stando de MONATO (teretaĝo). De tie ni kune veturos per metroo kaj buso al firmao BOSCH. La nombro de partoprenantoj estas limigita al 25. Interesatoj bonvolu registri sin ĉe la stando de MONATO.**

**Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio**

Lunde kunvenis 45 personoj, el kiuj 23 membroj. Prezidanto Stefan Maul atentigis pri kriza financa stato, pro kiu "Internacia Ĵurnalisto" devos esti reduktita je kelkaj paĝoj, por ke ĝi fariĝu malpli kosta. Aliflanke estas kuraĝiga eksploda populariĝo de korespondaj kursoj, kiu montris malsufiĉon da docentoj kaj sekvigis malsukceson pro tro granda sukceso". Kompilata estas ĵurnalisma terminaro de Aleksandro Korĵenkov. Laborgrupo esploros eblojn de movadaj informoj per elektronika reto.

**Jarkunveno de IFEF**

okazis marde kun ĉeesto de 87 personoj el 19 landoj. La kunvenon prezidis Istvá n Gulyá s, vicprezidanto de IFEF, kiu raportis pri la 48-a FEF-kongreso okazinta en Haago, Nederlando. Prezentitaj estis tri fakaj prelegoj el Germanio, Ĉeĥio, Slovakio. Eta grupo veturis al Eksperimenta Instituto de Ĉeĥa Fervojo, kie oni prezentis la provekzamenojn de la fervojaj kaj urbaj trajnlinioj.
Istvá n Gulyá s, KN 373

**La ekskursa merkredo**

forgvidis la kongresanojn el Prago al tre diversaj anguloj de Ĉeĥio. Via raportanto direktiĝis (kun la tuta kongresa aro en 4 aŭtobusoj!) al unu el la miraklaj lokoj de la ĉeĥa kulturo - al CESKY KRUMLOV. La sorĉa urbo protektata de UNESCO ĉe la meandro de la plej fama ĉeha rivero Vultavo kaj konsiderata unu el la mondaj kulturaj trezoraĵoj, malkaŝis al ni la sekretojn de la kastelo C eský Krumlov: belegan meblaron kaj valorajn artkolektojn - kiuj dokumentas pri la tempo kaj la regantoj de la kastelo ekde la 14-a jarcento. La kastela kapelo, nobelulaj dormejoj, manĝejoj, la amo per kiu oni tra jarcentoj gardis kaj riĉigis la kastelajn trzorojn, kontribuis al la tute specifa etoso: la ŝtormo kiu trafis la kastelajn ĝardenojn kaj la urbon dum nia vizito forportis nin el la reala mondo. Informitaj ĉiĉeronoj, kleraj tradukistoj, plaĉa manĝpaŭzo en la iama kastela stalo ripozigis la kongresanojn, lacajn de la tritaga kurado de programo al programo en la vastega kongresejo. La merkreda vizito al C eský Krumlov restos unu el la brilaj punktoj de la kongresa programo. Ĉeĥio per C eský Krumlov havas plian kialon por vizito.

*Spomenka Ŝtimec*

**Helpo por redaktoroj**

Por la unua fojo UEA-estraranino Michaela Lipari aparte invitis redaktorojn por dikuti kiel UEA povas helpi al ili. Leviĝis pluraj demandoj kaj petoj pri aktualaj informoj kaj fotoj. Konkretiĝis plano, ellabori strukturon de estonta inform-agentejo movada, en kiu kunlaboros UEA kaj fakasocio Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA).
-sm-

**Novaj akredittitaj ĵurnalistoj:**

- **Dr. Wolfgang M. Schwarz**, radio Dresdeno
- **A. Kaljusaar Talin**, Estonio,
- **A. Junusov**, Dagestana televido
- **Lech Kosieniak**, SLOWO, Varsovio
- **Bohumil Špacek**, Mladá fronta DNES
- **PaedDr. Tomáš Hejzlar**, Zora + FK (Japanio)
- **Martin Fabrice**, Le Monde - korespondanto
- **Stano Marcek**, Esperantisto Slovaka

**Tempon havas mi eternan**

*Lace kuŝas mi en lito, rezumpensas pri la tago:*
*min tre ĝenas deficito de la tempo por agado.*
*Al mi mankas ĉiam horo por plenumi ĉiun devon.*
*Tempon havi estas oro, tempon havi - kia revo!*
*La feino el fabelo - be!- aperas tre subite.*
*"La deziro: bagatelo. Mi plenumas ĝin kvalite.*
*Tempon havas vi eternan. Eĉ junecon vi ricevas."*
*Korpon sentas mi konsternan, dum nebule ŝi forkrevas.*
*Mil aferojn povas fari mi dum mia tuta vivo,*
*tempon ne plu devas ŝpari por vivado en aktivo.*
*Kiu diras:"Tuj vi faru!", tiu por mi tro nervozas.*
*Poste, iam mi reagu. Sed nuntempe mi ripozas.*
*Kie estas jena hasto, kiu daŭre min turmentis?*
*Mankas ankaŭ tiu drasto, kiun ĉiam tro mi sentis?*
*Geamikoj, familio maljuniĝis dum la jaroj,*
*interesas min nenio, nek la aĝo, nek la jaroj.*
*Pro aflikto ĝi tristiĝas, la restado tutsencela,*
*al pigrado ĝi instigas, al lanteco, granda, teda.*
*malaperas emocio: mi labori ne plu volas.*
*Griza, vana estas ĉio. Tro da temp' volon izolas.*
*Kun tempveno vol foriris kaj nuliĝis ĉiu amo.*
*La esperoj tomben drivis, sen lamentoj, sen deklamo.*
*Mi sopiras la momenton kun la fraz' : "Oldiĝas mi."*
*suferante la turmenton de senmorta tragedi' !*

*Trine*

**IKU - Prelego pri Heyrovký**

Marde dum IKU okazis du prelegoj. La unua pri la tutviva verko de akademiano Jaroslav Heyrovský , Nobel-premiito pri la ĥemio de 1959. La ĉeestantoj aŭskultis pri fundamentoj de polarografio kiel scienca metodo kun ebloj utiligi ĝin en la praktiko, kun biografio de Heyrovský kaj lia scienca kaj homa heredo. La prelegon kompletigis televida filmo, en 1994 farita de Ĉeĥa Televido, kies direktoro

Ivo Mathé volonte pruntis ĝin por la Esperanto-kongreso. La prelegon prezentis prof. V. Novobilský , CSc, rektoro de la kongresa universitato, kiu samtempe dublis la ĉeĥan filmon.

La duan prelegon prezentis RNDr. Josef Kavka pri Subakva vulkanismo en la nordbohema terciero, kaj kompletigis ĝin per ekzmploj de nordbohemaj mineraloj.

**Samseksanoj**

En plenplena salono la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj —LSG— sin prezentis al pli ol kvindeko da vizitantoj. Dum preskaŭ unuhora diskutado oni traktis la problemojn de ankoraŭ diskriminaciataj gegejoj. Kelkaj esprimis dankon al LSG por la agado antaŭenigi kaj plibonigi la staton de gegejoj en Esperantujo kaj ekstere. Sekvis la laborkundsido. Elektiĝis nova estraro:

Samideanoj Peter Danning, sekretario, Ulrich Wilke, kasisto, John Wells, prezidanto, estraranoj Torben Kehlet, Pam Lieber, Graham Blakey, kaj Jiří Proskovec.

**Feliĉu, eblas!**

Tiun broŝuron (tradukitan de Claude Piron) vi nepre havu, ankaŭ por viaj geamikoj! Petu senpage pliajn broŝurojn al Eldonejo PROSVETA, Ch-1808 Monts-de-Corsier, Svislando

AFRIKA AGADO

Antaŭ ol foriri elspezu solidare lastajn kronojn: aĉetu librojn por donaci al afrikaj esperantistoj. Aŭ rekte al tiuj, kiuj partoprenas la kongreson, aŭ ĉe la budo pri Afrika Agado. Sendi pakaĵon al Afriko estas ĉiam iom riska afero do profitu la eblecon rekte enmanigi librojn, gazetojn, donacojn...

La libroservo estas malfermita ĝis 14.00 sabate.

---

**Du Afrikanoj serĉas loĝadon** por 8 tagoj post la Kongreso en familio en Prago aŭ alie en Ĉeĥio. Proponojn trasnsdonu al LKK. Dankon!

# Pragaj Sonoriloj

Matenaj N-o 10

Kongresa kuriero, Vendredo la 26-an de julio 1996


## Internacia Kongresa Universitato

En la plenŝtopita salono "Karolo Píč" daŭrigis sian laboron Internacia Kongresa Universitato. Kiel unuan prelegonton prezentis la rektoro al la publiko magistron Kep Enderby el Aŭstralio. Temo de lia prelego estis "La indiĝenaj popoloj de Aŭstralio". Al la aŭskultantaro estis prezentita resuma historio de la australia indigena loĝantaro ("aborigenoj") de la pratempo ĝis hodiaŭ. La priskribon de la kortuŝaj krimoj kontraŭ aborigenoj en la pasinteco sekvis priskribo de iliaj vivkondiĉoj en la nuna Aŭstralio.

En la dua prelego "Franz Kafka kaj Prago: verkisto kaj lia urbo" koncentriĝis Doc. Dr. Mauro Nervi (Italio) al la praga medio, en kiu F. Kafka literature aktivis. Detale estis priskribitaj lokoj, kie Kafka vivis, domaĝe, ke ilustraj lumbildoj mankis. Por la nedetale informita auskultanto la preleginto forgesis diri, ke la plej granda - de li menciata - kontraŭjuda pogromo dum la dua mondmilito estis organizita fare de nazioj kaj ke Prago kaj nemalproksima koncentrejo Terezín estis nur ĉeĥa tereno, sur kiu la krimo de faŝistoj estis plenumita. Alia rimarko: en 1918 oni proklamis ne la ĉeĥan, sed la ĉeĥoslovakan respublikon.

La kompletaj tekstoj de ambaŭ prelegoj estis por dispono al la interesatoj (por 15 CZK).

Vlastimil Novobilský

## Azia agado

La 22-an de julio sinsekve okazis kunsidoj rilate al la azia agado. Matene, post la privata kunsido de komisiano pri Azia Esperanto-Movado por sia fermita kunsido kolektiĝis reprezentantoj de 4 landaj asocioj: el Ĉinio, Koreio, Japanio kaj Vjetnamio.

Posttagmeze okazis publika kunsido pri azia agado kun la ĉeesto de ĉ. 40 personoj el 13 landoj. La raportoj kaj diskutoj en la kunsido reale reflektis la nunan situacion de esperanto-movado en aziaj landoj kaj pozitive rezultis precipe por la Azia Esperanto-Kongreso en Ŝanhajo, Ĉinio, en la 22 - 25-a de aŭgusto.

TAKEUTI Yosikazu, KN 147

## Premio „Wiener-Schmidt" por Prof. Dr. Miloš Lánský

La ĉi-jaran Premion „Wiener Schmidt", aljuĝata de la Asocio pri Pedagogio kaj Informado (germane Gesellschaft für Pedagogik und Information - GPI) estis transdonita al Prof. Dr. Miloš Lánský pro elstaraj sciencaj kontribuoj al la progreso de la metodo de instruado. La premion transdonis Prof. Helmar Frank, prezidanto de la akademio (AIS), dum la solena fermo de SUS 16 (16-a studkonferenco de Akademio Internacia de la Sciencoj), en la Pedagogia Fakultato de la Karla Universitato en Prago.

R. Fössmeier, KN 2153

## Jarkunveno de ISAE

La jarkunvenon de la Internacia Scienca Asocio Esperantista enhavis historian rerigardon de la prezidanto Prof. Stop-Bowitz sur la 90-jara historio de ISAE. Sekvis la honorigo de la eksiĝonta prezidanto kaj ties laboro por Esperanto kaj por la Asocio. La raporto de la sekr.-kasisto emfazis la definitivan financan saniĝon de la Asocio kaj de ties organo Scienca Revuo post la grava krizo en 1988. Post unu horo okazis laŭ la programo kvar prelegoj - la tekstoj aperos en la Scienca Revuo. La redakcia komisiono intencis eldoni specialan kajeron honore al la jubileo kaj al la merita prezidanto. Kontribuoj dezirataj.

ISAE cetere informas ĉiujn prelegintoj de la IKU, ke la redakcio de la Scienca Revuo estas ĝenerale preta, laŭ proponoj el la jarkunveno, publikigi la tekstojn de la IKU-prelegoj. **Kontaktadreso por membriĝo aŭ abono** (30,- svisaj frankoj jare): ISAE, R. Hauger, Ringstrasse 13, CH 8172 Niederglatt, telefona numero 0041-1-850 28 82

## Oficiala akcepto ĉe la vicĉefurbestro de Prago

La 26-an de julio 1996 la vicĉefurbestro de urbo Prago Vladimír Drábek akceptis delegacion de esperantistoj, partoprenantoj de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, en la reprezenta salono de la praga Malnovurba Urbodomo. S-ro V. Drábek en sia alparolo salutis ĉiujn ĉeestantojn kaj esprimis sian konvinkon, ke la 81-a UK estos daŭre engravurita en la historion de Prago. Prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vlastimil Kočvara, dankis la urbon Praha kaj la vicĉef-urbeston mem por la pozitiva rilato al la UK kaj rememorigis pri la 13a UK en Prago, kiu okazis antaŭ 75 jaroj. Dankojn al Prago kaj ĝia reprezentantaro por la subteno rilatanta al organizo de 81-a UK esprimis ankaŭ prezidanto de UEA, Lee Chong-Yeong. Lian finan demandon, ĉu nun la vicurbestro sentas sin amiko de Esperanto respondis V. Drábek jese.

La akcepto estis finita per trarigardo de historiaj salonoj de la Malnovurba Urbodomo.

-nov-

**Mallongaj raportoj kaj sciigoj:**

La lasta kongresano, kiu venis, estas KN 2971 s-ano Victor Nto Nto el Kamerunio, kiun dumvoje al UK forkaptis fremdaj soldatoj. Tiel la landoj en UK atingis la nombron 66.

Ĵaŭde matene ĵurnalisto de RFI (Radio Francio Internacia) intervjuis 4 francajn gekongresanojn pri la UK kaj pri Esperanto. La intervjuo estos baldaŭ aŭdigata sur RFI (99,3 FM).

K.N. 805 kaj 809 publike dankas la oficialan helpanton Jan Navrátil (KN 2518), kiu perfekte plenumigante sian taskon, rapide kaj efike ebligis rehavi perditan aŭtomobilon.

**La Asocio po la enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo, NBN**

La kvarlingva asocio ekster Esperanto-movado NBN aperis la unuan fojon en UK. Dimanĉe la 21-an de julio je 17.00 organizis inform-kunsidon en la salono Pumpr, kiun ĉeestis 32 personoj el 16 landoj. La sekretario, D-ro Wim M. A. De Smet, skizis la signifon de NBN, ĝian enpenetron el la sciencan mondon, la uzon de Esperanto en la formado de la NBN-nomoj (nun jam pli ol 2000) kaj la rolon de la gvida Asocio, kiu jam ekzistas 25 jarojn.

## Denove pri SU-ĜOK

Dum UK okazis 2 prelegprezentadoj pri Su-Ĝok terapio, sufiĉe nova kuracmetodo, kiu baziĝas sur miljara antikva orientmedicina sperto. Krom tio mi kaj miaj helpantoj ĉiutage konsultadas, informadas multajn geinteresulojn. Po kelkaj personoj tage venas por informi min pri sia uzadsperto de Su-Ĝok. Jam aperis „mirakla" eksaniĝo, certe ankoraŭ nelasta. Hieraŭ iu sinjorino el Italio (KN estas konata) rakontis pri sukcesa memkuracado de la longdaŭra pieda parestezio kun vegetativaj ŝanĝoj per simpla masaĝo kun elasta ringo. Oni povus diri, ke jam sufiĉe granda parto de UK publiko sukcese „infektiĝis" pri Su-Ĝok. Logika sekvo de tiu-ĉi proceso estus fakasocia fondaĵo. Pri tio oni pritraktis kun kelkdeko da interesuloj kaj ankaŭ dum kunveno pri scienca kaj faka agado. Ĉiuj informoj pri tio haveblas ĉe organizanto - KN 932 Alfredas Maruška, M.D-ro (post-kongresa adreso: p/k. 50, LT-5250 Pasvalys,Litovio). Ni atendos pluajn reagojn de geinteresuloj, eĉ kun negativa kritiko.

Ni dankas ĉiujn subtenintojn kaj subtenontojn de tiu-ĉi ideo, dezirante bonan sanon.

A. Maruška

**La aŭtoraj duonhoroj en vendredo: Flavio Fonseka, je la 16.30**
- ankoraŭ estas en Libroservo havebla lia kantareto

## Interreto

Ĵaŭde ekde 12.30 h en plena Symoens vigle diskutis sub gvido de Mark Fettes uzantoj de Internet. En la interreto ni jam povas trovi La Flavajn Pagxojn de Esperanto, kreskas virtuala Esperanto-biblioteko, s-ro Pospíšil KN 2392 iniciatas virtualan terminologian centron. En interreta ortografio regas certa ĥaoso (aux hxaoso?). Rekomendite estas uzi modelon CX nur por interreto (ĝi solvas ankaŭ malfacilaĵojn pri vicordigo). En normo Latin 3 ĉapelitaj literoj kaŝas naciajn literojn, normo ISO 6937/II inkluzivas kromsignitajn literojn eble tutmondajn, sed ofte uzas du signojn por unu litero.

Franko Luin KN 1090 prezentis svedan interretan paĝaron pri Esperanto, enhavanta ekde ĝeneralaj informoj 'kio estas Esperanto' ĝis baza kurso de la lingvo. Per bildo ni prezentas eniran paĝon. Rigardu numeron sube, ĝi prezentas nombron de interesuloj, kiuj enrigardis paĝojn pri Esperanto dum unu monato - do cent (!!) dum unu tago. Do registru bazan adreson Esperanto.xx en via lando kaj varbu por Esperanto per Internet.

-mb-




**ATENTU!**

**Antaŭ definitiva forlaso de la kongresejo nepre ne forgesu:**
**viziti la Informejon kaj preni viajn perditajn aĵoj**
**vizitu la fotoservon kaj prenu viajn menditajn fotojn**
**vizitu la giĉeton kun suveniroj kaj aĉetu suveniron el la kongresa Prago!**

# Pragaj Sonoriloj

Vesperaj N-o 11

Kongresa kuriero, Vendredo la 26-an de julio 1996


## Nova Eŭroregiono: la Baltmaro

23 aktivuloj el ĉiuj baltmaraj landoj escepte de Danio kaj Finnlando partoprenis diskutrondon pri Baltmara Kunlaboro hieraŭ posttagmeze la 25-an. Interalie montriĝis gravaj aktivecoj rilate al ĝemelitaj urboj, kunlaboro inter universitataj rondoj kaj interŝanĝo de lernejanoj.
Ni ankaŭ decidis kunmeti datenbazon de la Eo-aranĝoj, kiuj jam okazas ĉirkaŭ la Maro, precipe por alvarbi pli da aliĝoj. Samtempe ni decidis pri plua aranĝado de Hansaj Esperanto-Tagoj alterne en la orienta kaj la okcidenta parto. Post la 1-a en Ratzeburg (DE), okazos 2-a en Mielno (PL) kaj 3-a en Aalborg (DK).
**Venonta diskutrondo okazos dum la UK en Adelaido.**
***Kontaktadreso:*** *Christian Darbellay, Kaiserstr. 43, DE-24143 Kiel*

## Akademia Forumo de AIS

AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) evidente subtaksis la interesecon de sia Akademia Forumo: Salono Bácskai montriĝis tro malgranda por la preskaŭ 50 homoj, kiuj volis aŭdi aŭ kundiskuti pri "Modifoj en la strukturo de AIS".
La diskuto, sub la lerta gvido de AProf. Dr. Werner Bormann, montris du precipajn direktojn:

- Starigo de regionaj klerigejoj parte etnolingvaj, por plivastigo de la studoferto kaj konatigo de AIS;
- Plidetaligo de la strukturoj de la dua (humanistika) kaj kvina (naturscienca) sekcioj de AIS, laŭ proponoj el tiuj sekcioj.

Pri la unua punkto estis konstatite,ke eblas starigi klerigejojn de AIS surbaze de regionaj asocioj, t. e. kuniĝoj de subtenaj AIS-anoj. Jam sin anoncis kunlaboremuloj el Germanujo kaj interesuloj el Hungarujo. La duan punkton enkondukis klarigo de la scienca fakostrukturo de AIS, kiu sekvas logikajn apriorajn principojn, male al multaj naciniveIaj universitatoj.
Pro manko de tempo necesis prokrasti la pluan diskutadon al la venonta studadsesio, SUS 17 en Rimini (IT) kaj San-Marino (SM), kiu okazos de la 1-a ĝis la 7-a de septembro 1996.

# KONGRESA KOMUNIKO

## 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 20. 7. 1996

En Prago ĵus finiĝis, kun 2971 kongresanoj el 66 landoj, la 81-a Universala Kongreso de Esperanto. Post 75 jaroj ĝi estis la dua UK en Prago. La datrevenon pligravigas la fakto, ke ĉi tie unuafoje okazis Nitobe-simpozio memore al Inazo Nitobe, iama Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, kiu kiel diplomato vizitis la Pragan UK-on en 1921, nomis Esperanton „motoro de internacia demokratio" kaj tre pozitive raportis pri siaj spertoj kun Esperanto. En la simpozio invititaj lingvistoj, politikistoj kaj aliaj fakuloj partoprenis prelegojn kaj diskutojn kun rilatoj al komunikado kaj lingva demokratio.

Dume miloj da kongresanoj ĝuis vicon da programeroj kaj serioze laboris en kunvenoj de fakaj asocioj kaj aliaj kunsidoj.

Unuafoje okazis seminario pri lingvopolitiko de la Esperanto-movado, prezento de Su-Ĝok terapio, fondkunvenoj de nefumantoj kaj sociallaboristoj kaj konfirmiĝis agado de rondo-kato.

Estas prezentita Manifesto de Prago, kiu respondas al la bezono difini la aktualajn sencon kaj celon de esperantismo en formo klara por neesperantistoj, diskoniginda en aliajn lingvojn (jam tradukita en la anglan, ĉeĥan, francan, germanan, hispanan, hungaran, latinan, nederlandan, portugalan).

La kongresa temo *Kulturo - ĉu valoro aŭ varo?* estis traktitaj en du altnivelaj prelegaroj fare de verkistoj kaj kulturaantaj esperantistoj. Kvankam forte konfliktis malsamaj opinioj, plejparto konsentis, ke kulturo devas esti varo altkvalita, en kiu komerceblo ne rajtas superi arton. Demokratio estas necesa, kvankam ne sufiĉa kondiĉo por alta kulturo.

Kadre de la tradicia Internacia Kongresa Universitato en 9 prelegoj elstaraj sciencistoj klerigis la publikon, kiu foje superplenigis la salonon. Du el la prelegoj, nome pri estetiko de beletra verko de prof. Ignat Florian Nociort kaj ludoteorio de Nobel-premiita prof. Reinhard Selten, daŭris ankaŭ per kompletiga kurso de Akademio Internacia de la Sciencoj - tia kunordigo de IKU kaj AIS okazis unuafoje.

Omaĝe al centjariĝo de la Esperanto-teatro efektiviĝis riĉa arta programo. Jam en la solena inaŭguro aperis apud muzikaj pecoj en prezento de bulgara Esperanto-Teatro ankaŭ fragmento el la teatraĵo „La unua brandfaristo" de Leo Tolstoj, kiu antaŭ cent jaroj en 1896 estis la unua esperantlingva teatra prezentado. Poste paradis aktorado de Eva Seemannová kun *Eliza Premislidino*, de Zagreba Studenta Esperanto-Klubo kun *Stilekzercoj* de Raymond Queneau, entuziasmigis la jam menciita bulgara Esperanto-teatro kun *Lanĉo* de Emilija Lapenna kaj *Triptiko* de Giorgio Silfer kaj *Lordino Makbeto* de Georgina Almanza. Ridsalvojn eksplodigis magiaĵoj de Trixini kaj farsaĵoj de fraŭlino Emily Barlaston.

En la muzikema Ĉeĥio ne povis manki recitaloj kaj kanto-prezentoj diversstilaj, muziko klasika de Aldo Florentin kaj de ĉeĥaj artistoj-esperantistoj, kanzona de Jadwiga Dzięgielewska, ĵazeca de Flávio Fonseca kaj korusa de Akordo. La internacia arta vespero rivelis aŭ konfirmis talentojn de esperantistaj amatoroj, ofte profesi-nivelaj.

La koridorojn de la dua etaĝo ĉarmigis pentraĵoj kaj grafikaĵoj de pluraj artistoj profesiaj, amatoraj kaj infanaj. En la libroservo prezentiĝis pli ol dek verkistoj kun siaj novaj verkoj en duonhoraj renkontiĝoj. Inter novaj titoloj krom originaloj aperis ankaŭ tradukoj, inter ili teatraĵo *Aŭdienco* de Václav Havel, alta protektanto de la kongreso.

La dumkongresaj diskutoj kaj ideoj denove pruvis, ke la esperantistaro survojas al la tria jarmilo kun fido kaj la konscio, ke la rolo de Esperanto kiel interhoma perilo povos nur graviĝi en la mondo, kie neegalranga komunikado kaj informado pli kaj pli postulos esence demokratian alternativon.

## Kongresa Rezolucio

### Al nova monda lingva ordo

La 81a Universala Kongreso de Esperanto,

okazinta de 20 ĝis 27 julio, 1996 en Prago, Ĉeĥa Respubliko, kie kunvenis 2971 kongresanoj el 66 landoj,

aŭdinte la debatojn kaj rekomendojn de ekspertoj el Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Eŭropa Parlamento, kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kadre de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri „Lingvo por internaciaj paco kaj demokratio",

konstatinte la gravecon de la principoj esprimitaj en la Manifesto de Prago,

**konfirmas** la urĝan bezonon de vasta tutmonda diskuto pri la lingvaj homrajtoj, la lingva egaleco, kaj la neceso de efika kaj altkvalita komunikado trans lingvajn barojn,

**emfazas**, ke la Esperanto-komunumo jam atingis rimarkindajn sukcesojn sur tiuj terenoj, kiuj meritas seriozan esploradon de kompetentaj lingvopolitikaj instancoj kaj fakuloj,

**kaj invitas** ĉiujn internaciajn organizaĵojn kaj lingvopolitikajn instancojn al kunlaboro kun la internacia Esperanto-movado por la konstruado de pli justa kaj demokratia lingva ordo.







## Valoraj kolektaĵoj ĉe la poŝtista giĉeto

Antaŭ ol vi forveturos, vizitu ankoraŭ unufoje la poŝt-ĝiĉeton por rigardi la interesajn telefon-kartojn kun sur-skribo en Esperanto. La unua estis eldonita al la 67-a SAT Kongreso en la moravia urbeto Strážnice. La eldonkvanto estis tre malgranda.
Sur parto de restaj telefon-kartoj estis por la UK en Prago surpresita nova teksto, ankaŭ en Esperanto. Ambaŭ certe estas kaj estos tre valoraj kolektaĵoj, do hezitu kaj aĉetu ilin!

## Ne plu estu kolizio de E-aranĝoj!

Ĉu vi organizas E-aranĝon kaj ne volas kolizii kun aliaj? Aŭ ĉu vi serĉas aktualan liston de E-aranĝoj por partopreni?

Ekde printempo la Budepeŝta Esperanto -Oficejo prizorgas la kompiladon de „Plena listo de E-aranĝoj" (dato, temo, adresoj, retligoj), - kiu estas aktuala ne nur en la momento de pretigo, sed daŭre, *dusemajne* estas aktualigata - kaj konsulteblas senpage!

Se vi organizas E-renkontiĝon (lokan, fakan, internacian ktp.) sendu la datumojn al pk 87, H-1675 Budapest, Hungario, fakse +36-1-2828885, rete: eventoj@odin.net .

Antaŭ ol vi decidas pri la dato, vi povas peti informon pri la „libereco / okupiteco" de via planita dato!

La tuta listo estas konsultebla per Internet ĉe la adreso: www.odin.net/esperanto/ -kaj aperas po monatoj en la gazeto Eventoj, kie vi povas ricevi ankaŭ pliajn informojn.

Szilvási

Noto al **Interreto** en Sonoriloj n-ro 10: menciitan E-paĝaron el Svedio vi trovos sub www.esperanto.se eventuale rekte la E-kurson sub www.esperanto.se/retkurso .
UEA-estrarano promesis, ke ĉi kongreso estas la lasta pra-kongreso sen aliĝo al Internet kaj al la reta poŝto.